

kovrilon ! Li frostis, meditante pri la nepra bezono ellerni esperanton ! Aŭskultebblas tio en la 738-a elsendo.

En Hilversum (Nederlando), 1954, dum TEJO-kongreso, naskiĝis la esprimo „Ne krokodilu !“ Antaŭe oni diris „Ovo ! Ovo ! Ovo !“ kontraŭ la nacilingvaj parolantoj en esperanta medio.

Post la hungara kontraŭrusa ribelo Claude Gacond invitis la rifuĝinton Istvan Morocs kaj, sekve al memorinda fonduo, la lerneja komisiono de la Sagne, kun la apogo de la inspektoro, instigis lin eksperimente instrui esperanton en elementa

lernejo. Tiel komenciĝis 8 jaroj de E-instruado. Li rakontas tion en la prelego 740-a.

Claude ofte organizis esperantajn skiferiojn en Adelboden, la unuan en vintro 1956-57. Dank'al li kreiĝis la asocio Esperanto-Edukistaro, Kultura Centro Esperantista, CDELI, la Gastejo Edmond Privat, Internacia FERIA Altlernejo, ktp. Sed nepre legu kaj aŭskultu tiujn radio-prelegojn sur lia retejo, kie iom post iom ili registriĝas skribe kaj aŭde : [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch)

Dankon al vi, Claude !

Nancy Fontannaz

### Kalendaro 2007

05/11/07 Diskutoj pri plursencaj vortoj (Daniel Schöni Bartoli) (\*)

**Sa 15/12/07 Zamenhofa Festo (sabate !!)**

(\*): en la stacidomo de Laŭzano ĉe la unua etaĝo, super « La Bufedo » je la 20-a

Ne forgesu, ke la Informilo estas **via ilo**. Dankon pro sendado al ni de viaj originalaj artikoloj, antaŭ la 10-a de novembro. La redakcio

## Laŭzana Esperanto-Societo

Société Lausannoise d'Espéranto

Poŝtfako - Case postale 246 \* CH - 1000 LAUSANNE 22

+41 (0)76 411 14 55 \* +41 (0)21 657 14 56

[esperanto@isuisse.com](mailto:esperanto@isuisse.com) <http://www.esperanto.ch/Lausanne>

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

informilo

Novembro, 2007 N-ro 09

**Lunde la 5-an de novembro 2007**  
**ĉe la unua etaĝo de la stacidoma bufedo**

**Kunekzercadoj de traduko de francaj plursencaj vortoj (Daniel Schöni Bartoli)**

Ĉiuj kune aŭ per grupetoj, ni provos trovi la plej bonajn solvojn por traduki la sencon de francaj plursencaj vortoj (homonimoj). Prenu viajn vortarojn.

Lundi 5 novembre 2007  
(1er étage du buffet de la gare, Lausanne)  
**Exercices collectifs de traduction de mots français "à plusieurs sens"**  
**(Daniel Schöni Bartoli)**

Tous ensemble ou par petits groupes, nous essayerons de trouver les meilleures manières de restituer le sens de mots français (homonymes) à plusieurs sens. Prenez vos dictionnaires.

### TEMARO

|   |   |
|---|---|
| Studado de la libro "La bona lingvo" de Claude Piron (eo) | 2 |
| Kaserolaj "Babetbabiĵoj": Vaŭda densigita vinbersuko (eo) | 3 |
| Malkovru la retan esperanton (5) (eo)                     | 4 |
| Hari Potter en esperanto (eo)                             | 5 |
| Concours destiné aux jeunes (fr)                          | 6 |
| Lunde la 1an de oktobro (eo)                              | 6 |

## Studado de la libro "La bona lingvo" de Claude Piron

En la lasta informilo, la komitato parolis pri novaj projektoj, kaj jen la unua jam komenciĝis. La ideo estas studi la libron "La bona lingvo" ( [http://eo.wikipedia.org/wiki/La\\_Bona\\_Lingvo](http://eo.wikipedia.org/wiki/La_Bona_Lingvo) ) de Claude Piron. Tiuj studaj rondoj okazos ĉiufoje ĉe iu alia el la partoprenantoj, je la 18h30. Iu el ili gvidos la kunvenon, kaj ĉiuj strebos kompreni la subtilaĵojn aŭ nekutimaĵojn de tiu libro, kaj diskuti la gravajn punktojn.

Tiu agado ne estas por komencantoj. Ĉiu partoprenanto preparas la kunvenon legante la pritraktotajn ĉapitrojn.

La unuaj datoj estas :

- ★ la 19a de oktobro 2007  
- ĉapitroj 1 kaj 2 (ĝis la 31a paĝo)
- ★ la 2a de novembro 2007
- ★ la 23a de novembro 2007
- ★ la 7a de decembro 2007

Se vi interesiĝas pri tiu agado kaj volas partopreni (eĉ se vi mistrakis la unuajn kunvenojn), kontaktu Daniel kaj Mara telefone je la 021 624 44 23 aŭ retmesaĝe ( [maradani@bluewin.ch](mailto:maradani@bluewin.ch) )

LES komitato

tekstojn, kiujn li nun ĵus zorge retajpis por meti ilin sur sian retejon. Sed li posedas registradon de la elsendoj ekde 1977, kaj ĝuste pri tiu jaro li ĉefe parolis al ni, ĉar tiu dato respondas al 25 jaroj de esperantiĝo, por li kiel por lia edzino Andrée, kiu dialogis kun li sur la kurtondoj. Tiam dum 6 elsendoj li rakontis sian riĉan esperantan vivon.

Claude klarigis al ni, kial la ricevo de tiuj elsendoj bonis ĉefe nur fore de Svislando : ĉar la kurtondoj reflektiĝas plurfoje kontraŭ la alt-atmosfera jonizita tavolo, plejofte nur post la tuta rondiro ĉirkaŭ la tero ili atingas la elsendlandon !

Je la fino de la unua elsendo, kiun ni aŭdis, Olivier Tsaut kantis ĝuste mian preferatan kanton « Matenkanto » ! Claude klarigis, ke tiam li proponis havi ne anglan muzikon. Tio alportis problemon, ĉar kutime la radioj elsendas 26% da angla muziko por ricevi diskojn kaj subvencion de Usono !

Claude plurfoje vojaĝis, ĉar liaj elsendoj estis tre ŝatataj, kaj li estis

invitita prelegi ekzemple en Parizo pri la penso de Privat, pri la Ruĝa Kruco en Italio, pri federalismo en Britio kaj Pollando.

Por niaj lundaj renkontiĝoj Claude instigas nin kelkfoje uzi liajn tekstojn kaj registradojn por lerni pli bone prononci la lingvon, ekzerciĝi pri kompreno dum aŭdado sen teksto sciante, ke venos 3 ekzercaj demandoj...

Claude ankaŭ parolis pri la nuna problemo de la lingvoj en Svislando : aliĝo al Eŭropa Unio metus la alemanojn en minoritatan situacion, dum la romandoj praktikas eŭropan lingvon... Eble pro tio la alemanoj donas la preferon al la angla, eĉ prefere al la uzo de la germana...

Per la radioelsendoj ni eksciis, ke Claude kaj Andrée konatiĝis en la porinstruista lernejo de Neuchâtel kaj dum kursoj de esperanto. Claude estis aktiva membro de Internacia Civila Help-Servo. Ekde 1953 li vizitis TEJO-kongresojn, kaj ni bone komprenis, ke ne taŭgas peti koverton meznokte... anstataŭ



Claude Gacond en Lausanne

La Société d'espéranto La Stelo (Genève) organise un

### Concours destiné aux jeunes

dans le but de prouver que l'espéranto est une langue qui s'apprend rapidement : elle cherche des jeunes prêts à tenter l'expérience de l'apprendre d'ici au 15 mars 2008 au moyen de n'importe quel outil : livres, cours, Internet, professeur privé, etc.

Les prix :

- ★ 1er prix CHF 3'000,—
- ★ 2ème prix CHF 2'000,—
- ★ 3ème prix CHF 1'000,—
- ★ du 4ème au 8ème prix CHF 500,— chacun.

### Conditions de participation

Les candidats à ce concours doivent répondre aux critères suivants :

- ★ Etre nés/es entre le 1er janvier 1980 et le 31 décembre 1990.
- ★ S'annoncer aux organisateurs par courrier postal avant le 31.10.07 (le cachet postal faisant foi). Seuls les cent premiers inscrit/e/s participeront au concours et recevront une confirmation écrite le 15.11.07.
- ★ Envoyer un texte original de 200 mots en espéranto au plus tard le 15.03.08 (le cachet postal faisant foi).

- ★ Se présenter à un examen qui aura lieu fin mars 2008.
- ★ Accepter que les textes rédigés à l'occasion du concours soient publiés.
- ★ Les lauréats seront informés personnellement au plus tard le 15.04.08. Le jury est seul compétent pour attribuer les prix.
- ★ Tout recours juridique est exclu.

L'inscription (sur une page A4) doit comprendre :

Nom – prénom – adresse postale – adresse électronique – numéro(s) de téléphone - date de naissance - statut (étudiant/e, salarié/e, autre) – lieu et date – signature

### Adresses :

Esperanto-Grupo « La Stelo »  
Genève - Concours  
Case postale 734  
1212 Grand-Lancy 1  
[www.concours-espéranto.ch](http://www.concours-espéranto.ch)

### Lunde la 1an de oktobro

Claude Gacond tre lerte retenis nian atenton, rakontante siajn spertojn kiel profesia radiopreleganto en Berno ĉe Svisa Radio Internacia inter 1962 kaj 1992, do ĉiusemajne dum 30 jaroj ! Ofte apenaŭ 10 minuta elsendo kaŭzas al prelegonto tutsemajnan laboron !

El la unuaj 15 jaroj li povis konservi nur siajn notojn, tio estas 700

### Kaserolaj « Babetbabilaĵoj »

#### Vaŭda densigita vinbersuko ("La raisinée")



Tradicia vaŭda specialaĵo farita per pomsuko, pirsuko, vinbersuko aŭ miksaĵo inter ili dum rikolto. Oni uzas ĝin por desertoj, kukoj kaj diversaj pladoj. La lastan jaron



invitis nin vinberista amiko por malkovrigi al ni, kiamaniere oni faras la vaŭdan densigitan vinbersukon (li uzis nur vinbersukon). Antaŭ dometa ŝirmejo meze de kampoj, vinbersuko bolis senĉese dum almenaŭ 24 horoj en kaldronego. Dum la tuta kuirado, familioj, amikoj, najbaroj alvenis jen por babili, jen por manĝi kaj trinki, infanoj tendumis ĉirkaŭe. Fojfoje, la vinberisto streĉis la orelojn kaj tintiletoj aŭdiĝis. Mi miris... "Bone observu !" : arĝenta monero de 5 frankoj trankvile tintis je la fundo de la kaldrono. Li klarigis, ke laŭ la fajropovo la monero moviĝas kaj la tintilmuziketo informas pri la ĝusta kuirado kaj denseco. Tio estas tre grava, ĉar kiam alproksimiĝas la fino, se pludaŭras la kuirado, la siropo brulos ! Sed kiam ĝi

sukcesas, bonan, dolĉan, vinbersaporan siropon oni gustumos !

Dolĉa torto kun vinbersiropa flano  
k.k. = kafkulero / s.k. = supkulero

Por bakplato 20 centimetra (6 personoj)

### Pasto

- 180 gr. faruno
- 70 gr. butero
- 2 s.k. sukero
- salo
- akvo aŭ lakto

Almiksu farunon, buteron, sukeron kaj salon movante ilin mane aŭ perforkete, ĝis vi ricevos mason kiel sablo. Aldonu iom post iom akvon aŭ lakton (ĉirk. 1 dl) ĝis via pasto iĝos ne tro mola.

Per rulpremilo etendu ĝin kaj metu ĝin sur bakplaton, kiu enhavas bakpaperon aŭ iom da butero ŝmirita sur la surfaco kun iom da faruno superŝutita supre (tio malhelpas paston glui). Truigu ĝin per forketo.

Baku en varma forno (180 gradoj) dum 20 minutoj. Prenu el la forno kaj lasu aparte.

### Flano

- 3 ovoj
- 1 ovoflavo
- 1.5 dl kremo
- 1 dl vaŭda densigita vinbersuko

Almiksu ĉiujn ingrediencojn. Verŝu tiun kremon sur la surfacon de la preskaŭ kuirita pasto kaj remetu vian torton delikate en fornon lasante la fornordon iomete mal-

fermita. Kuiru ĝin dum ĉirkau 30 minutoj je 180 gradoj. La flano estas preta, kiam la kremo ne plu estas flua. Prenu el la forno kaj lasu iomete malvarmiĝi. Poste metu ĝin sur kradon.

Alia pli simpla maniero servi nian densiĝitan vinbersukon :

Sur vanilan glaciaĵon versu iom da densigita vinbersuko kaj aldonu iom da cinamo. Viaj gastoj dankos vin....

Multan sukceson kaj bonan apetiton !

Elisabeth de Mestral

### Malkovru la retan esperanton

#### Kvina parto : la ludoj

Ne eblas ĉiam esti serioza. Post parolado pri la babilado kaj la literaturo, mi prezentas al vi kelkajn paĝojn ludendajn, eble por kiam vi lacas pri lerni la lingvon. Malfeliĉe ne estas tiom da retejoj kiel pri la literaturo, sed kelkaj estas ege interesaj. Jen ekzemploj :

Se vi konas la ludon nomatan "Tetris", vi eble plezuros ludante per "Vortaris": <http://members.fortunecity.com/megaribi/VORTARIS.htm> La reguloj estas samaj ol tiuj de la fama "Tetris", krom ke vi devos kunmeti vort-elementojn kune. La ludo tiel rapidas, ke vi eble perdos la ritmon. Provu ĝin, estas amuze !

Kiel fari ? Simple. Vi devas iri mal-supren de tiu paĝo kaj alklaki la

frazon "Se vi volas havi la ludon" (estas ligilo !). Tiel vi povas ricevi la programon sur via komputilo kaj uzi ĝin post instalado.

Mi ankaŭ trovis la faman skrablon <http://skrablo.ikso.net/> sed ĝis nun mi ne povis funkciigi ĝin. Eble vi trovos kaj povos klarigi al mi, kiel mi devas fari tion.

Alian kleran ludon vi povas ankaŭ sperti kun "Lingvo kvizo" sur la paĝaro de Lingva Prismo <http://www.lingvo.info/kvizo/index.php?lingvo=eo> Vi devas respondi al diversaj demandoj pri lingvoj. Tio ne estas facila, sed vi povas lerni multajn aferojn, pri kio vi neniam aŭdis antaŭe. La plej bonaj ludantoj atingis pli ol 1800 poentojn, sed mi ne atingis 100, kiam mi ekprovis. Faru pli bone ol mi !



La pendumito <http://krucenigmoj.tripod.com/pendumito.htm> estas ankaŭ tre fama ludo, aparte en lernejoj. La ludon vi povas aŭ ludi sur la retpaĝo aŭ elŝuti ĝin ĉe vi. Vi havas sur la paĝo nur tri temojn pri kio vi povas ludi : fruktoj, birdoj kaj landoj (mi venkis la komputilon pri la fruktoj). Sed eblas ankaŭ krei sian propran enigmon pri aliaj temoj. Kion fari estas klarigite sur alia paĝo <http://krucenigmoj.tripod.com/>

[com/pendkielkrei.htm](http://com/pendkielkrei.htm) Tiu ludo povas esti utila por lerni kaj lernigi la lingvon.

Por trajni la vortfaradon estas ankoraŭ amuza retpaĝo. Tiu nomiĝas virtuala fridujo <http://esperanto.lodestone.org/ktp/fridujo/> Vi scias... : estas kiel hejme, kiam vi metas amuzajn magnetajojn sur vian fridujon. Sed ĉi-tie estas nur vortaj magnetajoj kaj oni povas krei vortojn, eĉ longajn per vorteroj. Vi eĉ povas aŭdi la bruon... kiel sur reala fridujo ! Vi povas uzi tiun fridujon por verki poemojn. Kiam tiuj estas skribitaj, vi povas registri ilin kun via nomo aŭ kromnomo per alklakado sur la kapon de Zamenhof kaj poste aliaj retuzantoj povos ilin legi. Mi trovis tiun ideon ege amuza...

Mi ne provis ĉiujn sekvajn ludojn sed mi certas, ke vi estos ankoraŭ interesataj por malkovri novajn ludojn. Sur tiu paĝo estas tuta listo <http://mpovorin.narod.ru/ludoj/ludoj.html> : damludo, domeno, labirinto, puzlo kaj vermo estas la plej konataj. La ludoj ne estas aparte lingvaj ludoj sed ordinara komputilaj ludoj. La klarigoj ĉiam estas en esperanto. Mi provis iun de tiuj ludoj por vi : Blokita aŭto. Mi devas precizigi, ke post elŝutado de la programo mi devis malfermi ĝin per "Internet explorer", ĉar mi ne povis ludi per "Firefox". Tiel estas informadiko, ĉiam estas novaj miroj. Tiu ludo estas tre amuza : vi devas eliri la aŭtoparkejon movante

la aliajn aŭtojn. La nivelo por la komencantoj facilas, sed poste la ludo iĝas ege malfacila. Mi esperas, ke vi plezuros, sed mi atentigas vin, ke tiaj komputilaj ludoj povas naski grandan tempoperdon.

Alia paĝo kun multaj komputilaj ludoj estas ankoraŭ trovebla ĉe <http://www.ludanto.org/> Vi trovos aliajn konatajn ludojn kaj mi lasu vin provi ilin. Mi ne trovis sufiĉe da tempo por ludadi komputile... La reto grandiĝas ĉiutage. Mi certas, ke novaj ludoj ankoraŭ aperos. Kiel ne ludi por lerni la lingvon ?

Daniel Schöni Bartoli

### Hari Potter en esperanto

Kiu ankoraŭ ne legis la librojn de Hari Potter ? Se vi ne intencas, pro la modfenomeno, aŭ se vi multe ŝatis, ambaŭkaze vi eble interesiĝos pri la traduko de tiuj libroj al esperanto ! La unuan libron jam tradukis grupo de volontuloj, kaj ili nun provas publikigi ĝin, kaj tiucele devas pruvi al la angla eldonisto la ekziston de publiko por tia traduko.

Tial ili kreis retejon por kolekti subskribojn de eblaj legontoj. Se vi ŝatus legi la aventurojn de Hari Potter en esperanto, nepre iru viziti tiun paĝon <http://hp-esperanto.com/> kaj aldoni vian nomon al la jam 641 subskrib-longa listo.

Laurent